Sennacieca Asocio Tutmonda en Hispanio

# INFORMILO

**Numero 11/eo**
**Februaro 2008**

## ALVOKO AL PACO EN GAZA-REGIONO

*Komuniko de la Plenum-Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda, la 9an de januaro 2009*

La Plenum-Komitato de SAT forte protestas kontraŭ la perforto de la Israela ŝtataparato en la regiono de Gazao. Ĝi samtempe forte protestas kontraŭ la batalmetodo de Hamas, atentigante, ke buĉado de israelaj soldatoj aŭ civiluloj nur helpas plifortigi la naciismon de la israela aparto, donante al ĝi pretekstojn por daŭrigi sian imperiisman politikon, dum 20% el la israela loĝantaro vivas sub la oficiala limo de malriĉeco. Ĝi alvokas do al ambaŭflanka ĉesigo de militaj agoj.

La PK konscias, ke la israel-palestina problemo estas kompleksa, sed atentigas, ke solvoj baziĝantaj sur naciismo aŭ interkonsentoj inter kapitalismaj ŝtatestroj certe ne povas esti kontentigaj por ekspluatitoj el ambaŭ landoj.

Ĝi ankaŭ konscias, ke la sci-nivelo pri tiu-ĉi temo estas sufiĉe malvasta, kaj vokas do al informkolektado de faktoj kaj argumentoj por nutri la tiuteman rubrikon de la SAT-Kultura retejo: http://www.satesperanto.org/-Mezoriento-.html kaj venontajn numerojn de *Sennaciulo* http://www.satesperanto.org/-Sennaciulo-.html

La PK morale apogas ĉiujn kamaradojn, kiuj iel agadas proteste al la nunaj militkrimoj, kaj tenas sin je dispono de tiuj, kiuj pretas organizi grandskalan kampanjon por kontaktiĝi kun mezorientaj laboristoj kun la celo akiri pli bonan komprenon pri ilia preciza situacio kaj konsciigi ilin pri iliaj komunaj interesoj.




## ALVOKO EL HIROŜIMO

Kiel en pasintaj jaroj, ni publikigas la alvokon de Grupo de pacistaj asocioj el Hiroŝimo, Japanio, kiu organizas ekspozicion kontraŭ atombomboj kaj kontraŭ la militoj ĝenerale, okaze de la Internacia Tago de Virinoj.

En 2008 ili ricevis 157 mesaĝojn el 50 landoj. Ĉu ni estos pli (mal)bonaj en 2009 ol pasintjare?

**Por Internacia Virina Tago 2009, alvoko el Hirosima, Japanio**

Estimataj gesinjoroj en la mondo,

Okaze de la Internacia Virina Tago de UN, 2009, ni virinoj de Hiroŝimo havos kunvenon en la 8a de marto sub la temo: **Vivo kaj Kulturo, protekti vivon de infanoj kaj kune vivi en familio**.

Kion ŝanĝi por infanoj, homoj en estonteco? La vivo de infanoj, de geknaboj estas minacata de milito kaj konflikto en la mondo sub ekonomia krizo. Ekde jarfino de 2008, bombado atakas loĝantaron de Gaza, Mezoriento, viktimiĝas multaj infanoj, kaj doloras nia koro je raportoj el Gaza sub la aeratako.

Sub milito, konflikto kaj ekonomia krizo, rajtoj de infanoj libere vivi estas forrabitaj. Infana vivo droniĝas en malstabileco pro diversaj kaŭzoj, pro altrudita laboro, sklavkomerco, kaj sen edukado kaj neglekto. Granda deziro de ni virinoj estas protekti kaj flegi la vivon de infanoj.

Ĉijare, ni virinoj el Hiroŝimo, internacie alvokas pacon, kaj interŝanĝas solidarecan mesaĝon tutmonde. Ĉijare ni el atombombita Hiroŝimo alvokas al vi pri la temo: **vivo**, por ke ni kune kun vi konstruu vojon por prospera vivo de infanoj kun estonteco, ni luktu en sia loko solidarece kun vi.



Efikojn de la bomboj en Hiroŝimo, laŭ la interpreto de la artisto Nakazawa Keizi, en la bildrakonto "Nudpieda Gen", en Esperanto

Ni deziras ricevi de vi, responde al nia alvoko, vian mesaĝon kun noto pri viaj nomo, sekso, profesio, urbonomo kaj lando, ĝis la 20a de februaro por ke ni traduku ĝin en la japanan kaj prezentu en la kunveno.

Hirosima, la 15an de januaro 2009.

S-ino NOBUMASA Tieko, Prezidanto de komitato el 20 organizoj por Internacia Virina Tago 2009, Hiroŝimo. Kontaktpersono: Vicprezidanto s-ino OSIOKA Taeko, osioka @ mail.goo.ne.jp (forigu la blankajn spacojn)

**ALDONA NOTO:**

Laŭ informo de s-ino Osioka, la stato je la 8a de februaro estis jena: 136 mesaĝoj el 41 landoj :

Albanio 2/ Aŭstrio 3/ Aŭstralio 2/ Barato 2/ Belgio 14/ Brazilo 5/ Britio 2/ Bulgario 1/ Ĉeĥio 2/ Ĉinio 2/ Danio 1/ Finnlando 2/ Francio 31/ Germanio 5/ Grekio 1/ Hispanio 3/ Hungario 7/ Islando 1/ Israelo 4/ Italio 8/ Kanado 2/ Konga Respubliko 1/ Koreio 3/ Kroatio 1/ Latvio 1/ Litovio 1/ Luksemburgio 1/ Nederlando 2/ Nepalo 2/ Norvegio 1/ Pollando 3/ Portugalio 1/ Rusio 3/ Serbio 1/ Sudafriko 1/ Svedio 4/ Svisio 3/ Tanzanio 2/ Taĝikio 1/ Usono 3/ Uzbekio 1

La limdato de mesaĝoj estas la 20-a de februaro kaj, ni ankoraŭ atendas pliajn mesaĝojn.

Grupo de esperantistoj denove partoprenis la Mondan Socian Forumon, okazintan en 2009 en la urbo Belem, en Brazilo. Pliajn informojn en la la bulteno de MAS. Vidu informojn pri la Sociaj Forumoj kaj pasintaj agadoj ankaŭ en nia retejo.

# ESPERANTO EN SINDIKATAJ GAZETOJ

» En januaro aperis nova artikolo pri Esperanto en la revuo de la anarkiista sindikato CNT. En decembro estis aperinta "Esperanto por CNT-anoj", malgranda kurseto por sindikatistoj, kiu daŭros en venontaj monatoj, kaj kies du unuajn lecionojn vi povas trovi fine de tiu ĉi *Informilo*. Artikoloj pri la lasta SAT-kongreso kaj traduko el "Vortoj de Lanti" aperis respektive en oktobra kaj novembra numeroj de la gazeto.

Ili estas legeblaj ĉe http://www.cnt-ait.tv/v/periodicocnt/

» Ankaŭ en la retejo "En Xarxa", ligita al la sindikato CGT, estas ofte enretigitaj tekstoj en Esperanto. La adreso estas http://www.enxarxa.com/esperanto/. Tie oni ankaŭ povas legi periodan bultenon "El liberecana vidpunkto".

# *SENNACIULO*




Alvoko de la redaktoskipo de "Sennaciulo"

Karaj amikoj:

Jam iom da tempo *Sennaciulo* klopodas pritrakti dum ĉiu 2 monatoj temon. Ĉirkaŭ tiu temo la redaktoskipo serĉas homojn kiuj volas verki tekston.

Ĉi momente ni atendas kelkajn pliajn tekstojn kiuj pritraktas la temon "Ekstremdekstro en Eŭropo", kiun ni pritraktas en marta-aprila *Sennaciulo*. Vi bonvolu sendu vian kontribuon al - sennaciulo @ telenet.be - aŭ al kunordiganto pri la temo Djemil Kessous je adreso - dkessous @ yahoo.fr -, antaŭ la 28-an de februaro.

Sekvaj temoj estos "Infanoj en la mondo". Ideo estas ke la teksto pritraktas ĉion kio rilatas pri misuzado, ekspluatado de infanoj en la mondo. Ekzemple infanlaboro - nun oni konsideras en okcidenta mondo infano, personon kiu havas malpli ol 18 jarojn. Ankaŭ infanoj kiuj devas militservi ktp, ktp. Certe vi havas sufiĉe da inspiro por trovi problemon rilate infanoj pri kiu vi volas informi la legantojn de *Sennaciulo*?.

Alia temo; regule okazas grandaj diskutoj pri rajto al libera esprimiĝo. Ni certe memoras pri la "skandala karikaturo" kiu aperis en Danlando kaj kiu pritraktis mohamedanojn. Antaŭ semajno judoj en Flandrio ŝokiĝis pri karikatura filmeto sur nacia televido en kiu la "viktimoj" estis judoj. Intertempe strukturoj kiel la katolika eklezio devas engluti multajn kritikojn kiuj ofte estas prezentitaj en karikaturoj aŭ de humoristoj kiuj prezentas karikaturon pri popolgrupo aŭ strukturoj kiuj rilatas al kredoj kaj diversspecaj dioj. Ankaŭ handikapitoj kaj grupoj kiujn oni konsideras ne normala laŭ la ĝenerala bildo. Kie troviĝas la limo de libereco de esprimo? Ĉu iu rajtas primoki? Ĉu karikaturoj eblas, ĉu "amuza" kritiko pri popol-grupo eblas. Ni diskutu kie troviĝas libereco, limo de dececo.

Do, karaj amikoj, du novaj temoj pri kiuj ni atendas viajn kontribuojn pri a) Infanoj en la mondo, limdato por sendi vian kontribuon la 15-an de aprilo, kaj b) Libereco de esprimo kun limdato la 15-an de junio.

Viajn tekstojn vi povas sendi al la adreso - sennaciulo @ telenet.be, aŭ se vi preferas sendi tekston pere de helika poŝto al Jakvo Schram, Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen.

Neniam forgesu: *Sennaciulo* estas via revuo. Tekstoj kiu traktas aliajn temojn evidente ĉiam estas bonvenaj.

## KONGRESOJ

La 82-a SAT-Kongreso okazos en Milano (18-25a de julio 2009). Aliĝilo kaj informoj troveblas ĉe: http://www.arciesperanto.it/html/lang/eo/sat-2009/. Temo de la kongreso: "Elmigri senlime, vivi sennaciece".

Provizora programo

**Sabaton la 18-an**

Alveno de la partoprenantaj

Frakci-kunsidoj

Koncerto: ARCI Equinozio "Emanuele Scattaglini kaj la Vojirantoj - Voĉoj el tero, sonoj el maro"

**Dimanĉon la 19-an**

Solena malfermo

"Nekonataj verkistoj de Ukrainio", Dmitrij Cibulevskij

Vortludoj per la Dia Komedio, de kaj kun Giuliano Turone

**Lundon la 20-an**

Ĝenerala Asembleo

EKSKURSO Milano Renesanca

Koncerto: Reverie

**Mardon la 21-an**

Ĝenerala Asembleo

Frakci-kunsidoj

Prelego: "Klasbatalo en Usono" (Jakvo Schram)

Vespero kun surprizo

**Merkredon la 22-an**

TUTTAGA EKSKURSO

Elektu inter:

a) Boromeaj Vilaoj kaj Insuloj (Lago Majora);

b) Bernina Ekspreso;

c) La eta trajno de la Cent Valoj

Koncerto: baroka muziko

**Ĵaŭdon la 23-an**

Asembleo LEA-Komitato

Prelego: "Literaturo en Esperanto" (Nicola Ruggiero)

Vespero memorganizota de la partoprenantoj

**Vendredon la 24-an**

Plena Fina Asembleo

EKSKURSO Milano Rom-epoka

Adiaŭa vespero

La 64-a SAT-Amikara kongreso okazos en Paŭo (Pau, sude de Francio, proksime al la Pireneoj) inter la 11-a kaj la 14-a de aprilo 2009. Pliaj informoj estas haveblaj ĉe: http://www.esperanto-sat.info/rubrique101.html

---

**Por kontakti kun ni:**

**SAT-en-Hispanio (SATeH)**

Poŝtokesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

esperanto@nodo50.org

http://www.nodo50.org/esperanto